




# Boletín

n° 435 Julio - Septiembre 2021



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 435

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.  
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es  
angelarquillos@gmail.com

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj  
\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn  
\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro  
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es  
Aliaj aferoj (escepte de financaj):  
admin@esperanto.es

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961  
TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025  
Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

	<b>Estraro</b>
<b>Prezidanto:</b>	Ángel Arquillos López
<b>Vicprezidanto:</b>	Alberto Granados Orcero
<b>Sekretario:</b>	Manuel Parra
<b>Vicsekretario</b>	Isidoro Ortega López
<b>Kasisto.</b>	Jesús M. García Iturrioz
<b>Voĉdonantoj:</b>	Vicente Manzano (Viko)
“	Ana Manero

**Prezidanto HEJS**  
**kaj voĉdonanto:** William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# SALUTVORTOJ

Aŭtunas kaj la la verdaj folioj iĝas brunaj, kaj la suno mildiĝas, sed la verda stelo brilas kiel kutime, eble pli forte, ĉar la pandemio “foriris” kaj ni reprenas niajn taskojn, kiuj kuŝis surtable kaj ĉe niaj kapoj.

La nuna bulteno aperas kun prokrasto, sed plenplena je interesaj novaĵoj kaj amuzaj artikoloj, danke al gekontribuantoj, kiuj ĉi foje reagis tre rapide kaj sendis bonajn artikolojn. De ĉi tie mi dankegas ilin kaj mi esperas ripeti la samon venontfoje.

Mi jam fartas pli bone kaj oni povas diri ke ĉio enordas. Mi dankegas al multaj gesamideanoj kiuj interesiĝis pri mia sano, ĉar tio multe helpis kaj fortigis min.

Eble multaj el vi ne scias pri mia decido lasi la taskon redakti la bultenon, kaj nun post via rapida reago sendante amason da tekstoj, mi pripensas la aferon daŭrigi la taskon ĝis kiam aperos taŭga anstataŭanto, kvankam mi scias ke la afero estas iomete tikla, mi scias ke estas homoj kiuj pretas, sed kiel dirite, nun ne urĝas, ĉar ĉio enordas.

Ĝuu la legadon kaj pensu ke vi havas ion por diri al ni ĉiuj pere de mallonga mesaĝo en Esperanto, ĉar ĉiam estas spaco por kuraĝuloj. Mi atendas vian respondon.

La Redakcio

# ENHAVO

Salutvortoj	1
Varsovia Vento vizitis Malagon	2
Protokolo	3
Projekto Lorca	4
Unua virtuala Hispana Kongreso de Esperanto	5
Pri grupoj kaj asocioj	10
Bitoteko apreziatas	13
Omaĝe al Lorca kaj Cigana romancaro	15
Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 2021	17
Dentorelaj fervojoj en Hispanio	19
La Stranga angulo 2a ĉapitro	22
Deziras respondi	24
Muzika Angulo Camel	25
Iom da Matematiko (4)	30

---

## VARSOVIA VENTO VIZITIS MALAGON

Kun granda plezuro mi bonvenigis nian polan samideaninon Gosia Mlynarska, kiu vizitis Malagon pro laboraj aferoj, sed ŝi, kiel aktiva esperantistino, profitis sian liberan tempon por konatiĝi kun kelkaj andaluziaj samideanoj, inter ili, mi, kiu estis intervjuita de ŝi dum kelkaj minutoj, ĉar ŝi laboras por Varsovia Vento.

Ŝi demandis al mi pri mia sperto kiel nova prezidanto de HEF kaj pri estontaj projektoj. Kompreneble la respondo estis tre konciza, krom la projekto Lorca, la plej grava afero estas la 80a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu definitive efektiviĝos en la belega urbeto

Comillas, kaj ŝi kun entuziasmo ridetis kaj dankegis la respondon, ĉar mi invitis ĉiujn aŭskultantojn de Varsovia Vento ĉeesti la kongreson. Ŝi vizitos nin denove kun la celo intervui pliajn homojn kiel kutime dum niaj lastaj kongresoj.



Ángel Arquillos  
Prezidanto de HEF

# PROTOKOLO

## Eksterordinara Ĝenerala Kunveno 3a oktobro 2021

La 3-an de oktobro 2021 je la 10:01 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio pere de virtuala konferenco, en la kadro de la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (6a junio 2021)
- 2.- Serĉo de nova redaktoro por Boletín
- 3.- Ĉu en 2022 HEF rekotizu al Eŭropa Esperanto-Unio?
- 4.- Ĉu ĉi tiu aĉeti tenejon?
- 5.- Projektoj por 2021-2022
- 6.- Sugestoj kaj demandoj

### Ĉeestantoj:

Ĉeestas la virtualan kunvenon 6 membroj de la estraro kaj pliaj 20 membroj de HEF. Entute, 26 partoprenantoj, 1 el ili reprezentata de la sekretario, kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Kantabra, Bilbao, Fuenlabrada, Madrido (Liceo), Liberanimo (Teruelo), Andaluza kaj Frateco (Zaragoza).

### 1- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (6a junio 2021)

Ĝi estis publikigita en Boletín numero 434. Oni aprobas ĝin unuanime.

### 2- Serĉo de nova redaktoro por Boletín

La nuna redaktoro de nia organo Boletín deziras lasi tiun funkcion. Ĝis nun ne aperis kandidato por anstataŭi lin; la estraro plu serĉos. Tamen, li pretas daŭrigi la redaktan funkcion kondiĉe ke de nun li ricevos sufiĉe da kontribuajtoj. Venas kelkaj sugestoj por faciligi la taskon: forlasi la principon pri originaleco, reprodukti artikolojn de aliaj medioj; nomumi respondeculojn pri sekcioj.

### 3.- Ĉu en 2022 HEF rekotizu al Eŭropa Esperanto-Unio?

Rakontas Pedro Hernández ke dum lia prezidanteco (2009-2010) HEF decidis ne kotizi al EEU kiel protesto antaŭ ĝia malneŭtrala ideologia sinteno, tendenca al eŭropa naciismo. Montriĝas majoritata la sinteno por plena partopreno de HEF sine de EEU dum ni kontrolas ĉu daŭras la tiama ideologia sinteno.

Cetere, la ĝisnuna reprezentanto de HEF ĉe EEU (José Antonio del Barrio) esprimis sian deziron lasi tiun funkcion. La estraro serĉos kandidaton por anstataŭi lin.

#### 4.- Ĉu lui aŭ aĉeti tenejon?

Alvenis propono, ke HEF aĉetu tenejon en Madrido aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo, por ebligi la kreskon de ĝiaj diversaj servoj. Se la monhavo ne sufiĉus, oni povus kolekti libervolajn monhelpojn de la memboj.

Iu sugestas la formulon de lu-preno kun opcio de aĉeto.

La estraro esploros pri la eblaj kostoj kaj prezentos tiun informon en la venonta ĝenerala kunveno.

#### 5.- Projektoj por 2021-2022

Unu el la projektoj por la nuna jaro 2021 estas la partopreno de HEF en la Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado (IKIKO), okazonta de la 16a ĝis la 20a de decembro. Viko klarigas pri la konsisto de tiu evento (<https://ikiko.civiciencia.io/es/ikiko-es/>). La rolo de HEF en tiu projekto povus esti kolektado de laborforto por tradukado, kaj eventuale ioma financa kontribuo.

#### 6.- Sugestoj kaj demandoj

Alvenas sugesto, ke oni lanĉu enketon al la kongresanoj por koni ilian opinion pri la nuna kongreso, kiuj eroj estis plej ŝatataj, ĉu iu renkontis teknikajn problemojn...

Alvenas sugesto, ke HEF kreu bitan eldonon de kompilado de la ĉi-kongresaj prelegoj, dulingve.

Alvenas informo, ke nia eminenta kolego Augusto Casquero suferis infarkton kaj restis serioze afektita. La kunveno sendas al li plej koran brakumon kaj deziron pri resaniĝo.

La kunveno finiĝas je la 11:40 horo.

Manuel Parra  
sekretario

---

## PROJEKTO LORCA: ALVOKO AL LA GRUPOJ

Okaze de la Projekto Lorca entreprenita de Hispana Esperanto-Federacio, pri kiu vi povas legi en Boletín, n-ro: 433 (januaro-marto 2021), p. 19, la estraro deziras strategie utiligi ambaŭ eldonaĵojn rezultajn de la projekto, *Omaĝe al Lorca* kaj *Cigana romanca-ro*, por ankaŭ ekstermovade omaĝi ĉi tiujn du grandajn figurojn de nia kulturo, Federico García Lorca kaj Fernando de Diego.

HEF jam komencis starigi kontaktojn kun prestiĝaj institucioj por prezenti hispane ambaŭ verkojn al ne esperantista publiko. Kaj varme invitas la grupojn fari same je loka nivelo. Universitatoj, bibliotekoj, kultucentroj... estus plej oportunaj scenejoj por vaste diskonigi la ekziston de ĉi du novaj eldonaĵoj .

Por kuraĝi la aktivulojn, HEF sendos donace al ĉiu aliĝinta grupo po unu ekzempleron de ambaŭ libroj, la paperan *Omaĝe al Lorca* kaj la USB-karton enhavantan *Ciganan romancaron*. Kaj apogos la lokan agadon laŭbezone: prunto de la panela ekspozicio, sendo de informa materialo, ktp.

Bele, se post nelonge aperos en Boletín pluraj raportoj pri diversloke prezentaj aranĝoj!

La estraro

# UNUA VIRTUALA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

# 79<sup>A</sup>

## HISPANA ESPERANTO- KONGRESO

Virtuala Kongreso  
2/3 de Oktobro 2021



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Hispana Esperanto-Federacio

Dum la 2a kaj 3a de oktobro 2021, mi spertis neforgeseblajn momentojn, ĉar mi partoprenis mian unuan kongreson kiel prezidanto de HEF kaj mian unuan mesaĝon nun mi transkribas por tiuj, kiuj ne havis la ŝancon ĉeesti.

“Saluton, karaj geamikoj kaj gesamideanoj, kiuj telematike ĉeestas kaj partoprenas nian ĉefan Esperantan eventon.

Kun sincera kaj granda plezuro mi bonvenigas vin!

Eble vi jam sidas komforte gustumante tason da teo aŭ nigran kafon, atendente la disvolviĝon de ĉi virtuala kongreso.

Iamaniere la nuntempaj telematikaj eventoj, laŭ mi estas eĉ granda avantaĝo por multaj homoj, kiuj pro diversaj kialoj, manko de tempo,

laboro, familiaj problemoj, ktp. ne ĉiam povas ĉeesti kongreson, tamen mi tutcertas ke la plimulto el vi preferus preni trajnon, buson, aŭtomobilon aŭ eble aviadilon, se la distanco estas tre longa, ĉar homa varmo estas necesa en nia ĉiutaga vivo kaj eĉ pli se temas pri Esperanta evento.

Esperanto estas lingvo de paco kaj amikeco kaj pro tio, miloj da homoj ofte kunvenas okaze de renkontiĝoj, kongresoj kaj pluraj eventoj, kun la celo babiladi kaj ĝui la kutiman bonan etoson en la elektita urbo kie ĝi okazas. Ĉi-foje pro ĉies konataj kialoj, la urbo nepre estas Esperantujo, kompreneble laŭ mi, Esperantujo estas la plej alloga loko por kunveni. Ĉu mi ne pravus?

Jam pasis preskaŭ unu jaro de kiam mi estis elektita kiel prezidanton de HEF tio estis en la 18a de oktobro 2020, kiel vi ĉiuj bone memoras, ĉar ĝi okazis dum la komenco de la sanitara krizo generita de kovim-19, kiu kruele atakis la homaron, kaj ĝi daŭre agadas, sed kun malpli da forto, kaj ankoraŭ oni ne vidas tre klare kiam ĝi vere finos sian minacan agadon.

Sciencistoj, kuracistoj kaj multaj virusologoj, ne vidas tre klare kiel elradikigi ĝin. Estas konate de ni ĉiuj ke kelkaj milionoj da homoj forpasis en la mondo pro tio, kaj pro tio centoj da eventoj disvolviĝas tiamaniere, ĉar la danĝero infektiĝi estas alta kaj la sekvaĵoj de la malsano en multaj homoj estas kruelaj kaj nekuraceblaj.

En la komenco, precipe maljunuloj estis la viktimoj, sed, bedaŭrinde, iom post iom oni povas konstati ke tiu viruso atakas ĉiujn. Neniu el ni estas imuna kaj ĉiuj riskas, eĉ tiuj, kiuj jam estis vakcinitaj.

La homaro de antaŭlonge venkis multajn epidemiojn, tamen nuntempe ni havas pli da rimedoj, sed, mi timas ke pliaj rimedoj ne tute sufiĉas, kvankam la nombraj vakcinoj, kiuj estis disvolvigitaj en tre mallonga tempo mildigas la problemon, bedaŭrinde tute ne cento pro cento.

Mi scias prekaŭ nenion pri la afero, mi nur legas kaj aŭskultas novaĵojn pri novaj mutacioj, novaj variantoj kiel: Delta, Lambda, ktp, kaj mi ankaŭ legas pri la efiko de tiuj vakcinoj, sed la ĝenerala malfido estas tre forta, ĉar estas multaj neistoj kaj homoj, kiuj timas la vakcinon pli ol la viruso mem.

Ni scias pri nombraj gesamideanoj, kiuj forpasis dum la lastaj monatoj pro la terura viruso, kaj de ĉi-tie, ni profitu la okazon memori ilin kun frata amo, kaj de ĉi-tie, ni kondolencu la familianojn.

Hodiaŭ ni kunvenas okaze de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu pro la neaten-dita pandemio, disvolviĝas telematike, tamen laŭ mi, estus facile imagi ke ni kunvenas ĉe granda salono, kun homoj alvenintaj el diversaj lokoj de nia duoninsulo kaj eksterlande...

Sed la malĝoja realo estas ke mi sidas ĉe komputilo de kie mi prelegas kaj salutas vin, kiu certe ankaŭ sidas hejme, kaj kun atento aŭskultas mian unuan mesaĝon, kiu temas precipe pri la monda problema, kaj pri tio mi esperas paroli venontfoje, sed pri la elradikigita viruso, kiel pasinta malbona sperto.

Mia unua prelego post kelkaj monatoj de mia elekto kiel prezidanton, bedaŭrinde devas okazi interrete, kvankam tio ja ne sonas strange al vi, kaj mi esperas ke ĉio, kion la lkkanoj, aranĝis, plaĉos al ni, kvazaŭ ni partoprenus ĉeeston kongreson, ĉar la programo estas vere interesa kaj alloga.

Mi tute certas, kaj mi fidas je ili, kiuj volonte akceptis la komplikan laboron, kvankam mankas la amuza interkonatiĝa vespero, kaj la tipaj salutoj nome de la diversaj regionoj aŭ landoj, kaj la ekskursoj, bierumado, bankedo, babilado, promenado, komuna foto, brakumado, renkonto kun novaj homoj, vizitado al la libroservo, ktp.

Longa listo de mankoj, bedaŭrinde, kiujn ni ne povos solvi telematike, sed baldaŭ denove la ĉeesta evento okazos, ĉar la tempo kuras kaj kuracas, kaj mi tutcertas ke ĝi okazos pli baldaŭ ol ni imagas, ni fidu je la scienco kaj je la belega urbeto Comillas, kiu atendas nin plena de lumo kaj arto.

Ni imagu multon kaj ankaŭ ni multon devas cerbumi por ĝui la okazon, kvazaŭ temus pri ĉeesta evento. Sed mi fidas al tiuj karaj gekolegoj, kiuj ĉiam partoprenas la kongresojn kaj kontribuas per interesaj prelegoj: kantoj, teatraĵoj, omaĝoj, ktp, ĉar mi scias ke ili multe laboris por okazigi la kongreson, ĉar nuntempe prekaŭ ĉio eblas pere de la reto, mi tute ne dubas pri tio kaj mi ja sentas la bonan etoson, kiu regas la virtualan salonon kun pendigitaj afiŝoj pri la venonta kongreso, mi imagas la ekrion de bebo, kaj murmuron de iu, kiu malfruiĝas kaj petas permeson sidiĝi ĉe vaka sidloko.

Imago estas tiel, kaj la menso kredigas nin ke ĉio okazas en la realo, kaj tion ni nepre devas kredi, se ni volas vivi virtualan sperton kvazaŭ reala evento.

Ĉi speciala kongreso, kompreneble, ne anstataŭas tiun de Comillas, kiu estos la 80a, kaj oni planas okazigi venontjare kun ĉiaj garantioj, kaj mi esperas ke ĝi plene sukcesos kiel aliaj kongresoj okazintaj en kelkaj landoj, ĉar jam estas pretigita por ni ĉiuj, kaj nur mankas prepari viajn sakojn kaj trovi bonan loĝejon por ĝui la belan kaj monumentan urbeton.

Ni fidu je la scienco, kiu certe kapablos solvi aŭ almenaŭ, sufiĉe mildigi la ankoraŭ minacantan danĝeron, kiu permesos al ni kunveni kaj laŭplaĉe babiladi pere de nia kara lingvo kun ĉiuj geamikoj el la tuta mondo, ĉar telematike ne ekzistas baroj.

Kaj nun, se vi sidas komforte, pri tio mi tute ne dubas, atentu la disvolviĝon de la programeroj, kiu temas pri grandaj homoj de la Literaturo, esperantistoj kaj ne esperantistoj. Inter ili elstaras la granda mondkonata hispana poeto, Federico García Lorca.

La sperto valoros la penon, ĉar ĝi estos vere interesa kaj fruktodona kiel kutime. Ĉi-foje ĉio okazos en Esperantujo.

Ni ĝuu la kongreson kaj mense ni kantu la himnon de la Espero.


Mi deklaras malfermita la 79an Hispanan Kongreson de Esperanto.

Koran danton”.

Kaj tuj sekve la kongreso sukcese komencis per Omaĝo al la poeto García Lorca kaj Fernando de Diego kun interveno de Ana Manero, Miguel Fernández kaj Duncan Charter, prezidanto de UEA, kiu tre bone konas la biografion de Lorca kaj tre bone regas la hispanan.







Por vigligi la etoson, ne mankis amuzaj spritaĵoj “bonaj kaj malbonaj”, kvankam mi multe ridis dum kelkaj minutoj da tiaj komikaj momentoj.

Ankaŭ Lorenzo Noguero, prezidanto de Frateco, omaĝis al nia kara, Antonio Marco Botella per

kortuŝaj vortoj.

Vicente Manzano, (Viko), profesoro de la Universitato de Sevilo, prelegis pri *Scienco kaj Esperanto*, kaj *Scienco kaj demokratio*.

Marisol Soriano el Sevilo, prelegis pri *Lingvaj rajtoj kaj Esperanto*.

Ricardo Felipe Albert Reyna, malagano, surprizis nin per interesa prelego *Kio estas semida lingvo*.

Kaj fermis la prelegojn la kataluna Javier Alcalde Villacampa, kiu disertis pri *Enkonduko al politiko en la evoluiga mondo*.



Kaj por fermi la kongreson, jen miaj vortoj:

Venis la tempo adiaŭi per virtualaj brakumoj kaj realaj larmetoj..

Du tagoj estas mallonga tempo por okazigi kongreson, tamen ni kuraĝis tion fari kaj mi kore dankegas vian ĉeeston, ĉar la evento sukcesis danke al vi, kiuj volonte kaj atente restis ĉe via komputilo profitante la okazon scii pli pri elstaraj literaturistoj kiel la poeto Garcia Lorca kaj esperantistoj kiel Fernando de Diego kaj Antonio Marco Botella kaj ne mankis deklamado de poemoj, Scienco kun rilato al Esperanto kaj distraj momentoj, ktp ktp. Koran dakon al ĉiuj kunlaborantoj kiel Marisol, Lorenzo, Miguel Fernandez kaj Miguel Aduriz, Viko, interalie.

Mi esperas vidi vin denove okaze de la ĉeesta kongreso en Comillas, kie ni povos babiladi persone kaj ĝui pli ampleksan kongreson dum proksimume unu semajno da reala tempo kaj tie ĝui la belecon de la urbeto kaj aŭskulti la partoprenontojn, kiuj kutime surprizos nin per bonaj prelegoj, teatraĵoj, muziko, deklamado, ktp. Kaj tuj poste ni povos promenadi tra la belaj stratoj kaj ĝardenoj de la riĉa monumentaro de Komillas.

Do, se vi nun feliĉas, ankaŭ mi kaj se vi jam planas partopreni venontan eventon, Esperantujo ĉiam ofertas ion novan, do antaŭen, ne hezitu, ĉar atendas komfortaj sidlokoj por vi ĉiuj ĉe alloga salono.

Kaj nun, antaŭ ol adiaŭi vin mi legos ĵus bakitan poemeton inspirita hazarde, kiu rilatas al la ĵus finita kongreso.

Mi verkis poemeton  
sen pretendo  
Por diri, ĝis revido  
Kun kontento  
Al ĉiuj ĉeestintoj  
Al kongreso.

Karegaj geamikoj,  
Kun dankego  
Mi bonvenigos ĉiujn  
Al ĝardeno  
Ĉe l'urbeto Komiljas,  
(Santandero),  
Kie nur regas arto  
Kaj mistero.

Mi deklaras fermita la 79an Hispanan Kongreson de Esperanto.

Ĝis tre baldaŭ!

Ángel Arquillos  
Prezidanto de HEF

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## ESPERANTAJ KURSOJ EN SEVILO

Komenciĝis oktobre en Seviljo la nuna lernojara esperanto-kursoj 2021-22. Estas du. Jen ili:

### LA UNIVERSITA KURSO:

Kiel en lastaj jaroj tiu kurso estas baznivela, kun la celo ankaŭ atingi la lernonivelon sufiĉan por B-1 ekzameno.

La kurso finiĝos en la printempo 2022 ĉar devas alĝustiĝi laŭ la universitataj 6 kreditoj atingeblaj per minimuma horaro.

Kiel en lastaj ĵusaj jaroj la kurson iniciatis Guillermo Molleda kiu kunordigas la distancan lernigadon. Koncerne ĉe-klasa, instruas Fernando Estepa kaj Antonio Rodríguez.

Samkiel en lastaj jaroj la kurso disvolviĝas en la Fakultato pri Financo kaj Turismo. Antaŭe estis en tiu Psikologia kunordigita de Vicente Manzano kun kies helpo ni povus kalkuli ankaŭ nun.

### URBODOMAJ KURSOJ:

En la Casa de las Sirenas ("Centro Cívico" de la urbocentro).


Temas pri la tiea preskaŭ du-jardeka sinsenkva kurso. Tiu kurso de la Sevila Esperanta Asocio kunordigas kaj gvidas ties repondeculo pri lernigado Antonio Rodríguez (kunhelpata senecese de Fernando Estepa).

La kurso komenciĝis meznivela, sed povas duopiĝi en ankaŭ baza kondiĉe de venontaj novlernantoj.

### 110 JARIĜO DE ESPERANTO EN SEVILLA.

Okaze de la 110 jariĝo de l'ekesto de l'Sevila Esperanta Grupo en Seviljo, la Sevila Esperanta Asocio aranĝas la celebradon de evento, samkiel omaĝon al kelkaj samideanoj kies kar-memorero restas en niaj koroj.

La evento estiĝus meze de oktobro ĉar tiu monate, la tagon 12-an de 1911 fondiĝis nia asocio.



Antonio Rodríguez Gash

## MADRIDA REGIONO

### NOKTO DE LA LIBROJ KUN LORCA

La 1an de oktobro 2021 Madrida Esperanto-Liceo celebris la unuan ĉeestan aktivaĵon en la sidejo post bedaŭrinde multaj monatoj per la partopreno en la *Nokto de la Libroj*, kiun organizis la Madrida Komunumo (unue antaŭvidita por aprilo, sed fine prokrastita al tiu ĉi dato). Madrida Esperanto-Liceo aperas en la broŝuro kaj kalendaro de la evento.

MEL omaĝis al la granda poeto Federico García Lorca, okaze de la 50a datreveno de la traduko al Esperanto de lia verko “Cigana romancaro”, kaj de la 85a dat-reveno de lia murdo, per la antaŭprezentado de la du verkoj produktitaj de HEF, pri kiuj vi povas legi aliloke en tiu ĉi numero: la reeldono en bita formo de la “Cigana Romancaro” kaj la publikigo de nova antologio de poemoj de Lorca, tradukitaj en Esperanton fare de Miguel Fernández, kun titolo “Omaĝe al Lorca”.

La librojn prezentis Ana Manero kaj Miguel Fernández, kiuj estis enkondukitaj de la prezidanto de MEL, Félix Jiménez Lobo. Ĝi estis sekvata de libera deklamado de poemoj de Lorca, en kiu partoprenis la ĉeestantoj.

La evento estis filmita, kaj baldaŭ vi povos ĝin trovi en la retejo Youtube.



### KURSO KAJ PREZENTADOJ EN FUENLABRADA

Fuenlabrada Esperantista Ligo planas komenci sian ĉeestan aktivadon en la venontaj datoj. Ĝi anoncis ĉeestan kurson ende la 12a de januaro 2022. Ĝi daŭros kvin monatojn, kun klasoj dufoje semajne (marde kaj ĵaŭde) kaj disvolviĝos en la nova sidejo de la asocio, en la C.E.P.A. “Paulo Freire”, strato Creta, 2 Fuenlabrada (apud metrostacio Fuenlabrada-Central). La prezo estos 25 eŭroj por la tuta kurso, pagota post la dua klaso. Kiel lernolibro oni utilitos “Esperanto per rekta metodo” de Stano Marĉek.



Post diskonigi la kurson kaj Esperanto ĝenerale, Juan del Castillo prelegos en tiu sidejo po unu fojon ĉiusemajne ende la 18a de oktobro. Por pliaj informoj pri la kurso aŭ la prezentadoj skribu al la adreso: [esperantoestodos@gmail.com](mailto:esperantoestodos@gmail.com). **11**

## STUDAĴO PRI ESPERANTO EL ANTROPOLOGIA VIDPUNKTO

Nia juna amiko Jorge Brasal prezentis sian finstudan laboraĵon (*Trabajo de fin de grado*) por kompletigi siajn studojn pri Socia kaj Kultura Antropologio (*Grado en Antropología Social y Cultural*) en la Aŭtonoma Universitato de Madrido. La titolo estis “El Esperanto: lengua y comunidad en el siglo XXI”. Li atingis noton de 9,4. Gratulon al Jorge!

La teksto estas konsultebla en la retejo de la Bitoteko ĉe la adreso: <https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6427>.


### ESPERANTO EN LIBRO PRI EKZILITOJ

La lundon 4an de oktobro, la Asocio de idoj de hispanaj ekzilitoj (Asociación de Descendientes del Exilio Español, ADEE) prezentis publike en Madrido la duan volumon de librokolekto pri la perdo de talento post la hispana ekzilo, kun la titolo “Talento y exilio: La diáspora del conocimiento II”.

Inter la biografiitoj aperas konata esperantisto, la militisto Julio Mangada. Lian profilon verkis Toño del Barrio.

En la libro oni mencias la esperantistecon de alia el la biografiitoj, la poeto kaj tradukisto Álvaro de Orriols, fama dum la respublikana periodo, sed nun bedaŭrinde tre forgesita.

En la unua volumo de la kolekto jam aperis profiloj de aliaj talentaj ekzilitaj esperantistoj, kiel Francisco Azorín kaj Emilio Herrera.



### RAPORTO EN KVARTA-LA GAZETO

Sekve al la informado farita okaze de la Tago de Esperanto en julio, la gazeto “Chamberí 30 días”, kiu informas pri la kvartalo Chamberí, kie troviĝas la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, pretigis raporton pri Esperanto kaj pri nia asocio, surbaze de intervjuo farita al aktivuloj.

Vi povas legi ĝin en la retejo: <https://www.chamberi30dias.es/reportajes/chamberi-punto-encuentro-difusion-esperanto>.

# BITOTEKO APREZATAS

Okaze de la unua renkontiĝo de la partnera projekto Reta Edukado Nun<sup>1</sup> financita de Eŭropa Unio per la programo Erasmus+, okazinta en Ĝurdevac, Kroatio, de la 12a ĝis la 16a de aŭgusto 2021, mi estis invitita prezenti la Bibliotekon<sup>2</sup> Juan Régulo Pérez kaj la Bitotekon<sup>3</sup>. Dum la renkontiĝo oni pritraktis plurajn temojn, kiuj tuŝas mian ĉefan agadon en la Esperanto movado: pretigado de ciferecaj dokumentoj, efika arkivigado kaj bonkvalita libro-eldonado. Tial, la invito rezultis al mi aparte alloga kaj malgraŭ tio, ke la pandemio ne estis ankoraŭ superita, la atendo de interesplena etoso antaŭvidebla pro la anoncitaj partoprenantoj, kuraĝigis min akcepti la proponon. Kaj mi tute ne pentis. Male, mi sentas min tre honorita, ke oni kalkulis je mi por la okazo. Mi aparte dankas prie al Sara Spanò, kiu kontaktis min, kaj al la ĉefa surloka organizanto, Josip Pleadin



## BITOTEKO kadre de la servoj de Biblioteko Juan Régulo Pérez



Ana Manero  
Erasmus+ Reta edukado nun  
Ĝurdevac, aŭgusto 2021

Dokumenta Esperanto-Centro<sup>4</sup> gastigis ĉi unuan renkontiĝon, sed estos pluraj aliaj kun diversaj temoj laŭ la disvolvo de la projekto en rilato al la ĉefa temo Reta Edukado Nun. La projekton kunordigas Bjalistoka Esperanto--Societo (Pollando), kaj ĝin partoprenas Dokumenta Esperanto--Centro (Kroatio), Esperanto--KulturCentro Tuluzo (Francio), Bunta Esperanto--Asocio (Italio) kaj Kosmo Strategio ltd. (Britio). Vere interesa iniciato.

<sup>1</sup> <https://espero.bialystok.pl/eo/reta-edukado-nun-en-durdevac/?v=9b7d173b068d>

<sup>2</sup> <http://biblioteko.esperanto.es/>

<sup>3</sup> <http://bitoteko.esperanto.es/>

<sup>4</sup> <http://novo.dec-kroatio.hr/eo/o-nama/>



En ĉurĉevac, unu el la partoprenantoj, Pascal Dubourg Glatigny, kiu parolis dum la renkontiĝo pri la nunaj stato kaj defioj de la Esperanto-arkivoj, traktante la temon ĉefe el la vidpunkto de esploro, invitis min virtuale prezenti Bitotekon kadre de la simpozio okazonta kiel fermo de la internacia konferenco pri Lingvaj Praktikoj en Transnaciaj Kunteksto, organizata de la Centro Marc Bloch de Berlino<sup>5</sup> por esplorado en sociaj sciencoj, inter la 6<sup>a</sup> kaj la 8<sup>a</sup> de septembro .

La simpozio traktis la temon pri arkivoj en rilato al esplorado pri Esperanto-historio kaj kunigis esploristojn kaj zorgantojn de arkivaj materialoj el diversaj partoj de la mondo. Ĝi okazis la 8an de septembro, en la angla kaj Esperanto.



Menciindas, ke unu el la sesioj de la konferenco temis pri la specifeco de Iberio, kun intervenoj de Pilar Requejo de Lamo (University of St Andrews), kiu prelegis pri *Regionismo, naciismo, internaciismo kaj Esperanto: la kazo de Iberio*, kaj Javier Alcalde (Universitat Autònoma de Barcelona), kiu prelegis pri *Esperanto en la hispana Milito: de internaciismo al esperantismo?*

Ankaŭ al Pascal Dubourg mi elkore dankas, mianome kaj nome de la bitoteka skipo, pro lia invito prezenti nian laboron en internacie akademia etoso.

Ana Manero

---

<sup>5</sup> <https://cmb.hu-berlin.de/fr/agenda/evenement/archive-in-research-on-esperanto-history-identifying-and-structuring-source-materials-and-current-challenges-in-their-preservation>

# *Omaĝe al Lorca kaj Cigana romancaro*



Kiel anoncite en Boletín, n-ro: 433 (januaro-marto 2021), p. 19, kadre de la Projekto Lorca, Hispana Esperanto-Federacio planis entrepreni du novajn eldonaĵojn.

Unue, reeldoni bitformate la majstroverkon de Federico García Lorca, *Cigana romancaro* (hispane, *Romancero gitano*), en la brila traduko de Fernando de Diego, okaze de la 50-jariĝo de ĝia unua eldono aperinta en la serio *Beletraj kajeroj* de la kolekto *Stafeto* dank' al la senlaca kaj alt-kvalita laboro de Juan Régulo.

En tiu unua eldono, ne nur logas la elstara traduko de De Diego sed ankaŭ lia analizo de la poemaro en sugesto-plena prezento. La antaŭparolon verkis William Auld, kiu agnoskas la talenton de De Diego kaj subtrekas la fakton, ke necesis ja la apero de lia figuro por povi finfine entrepreni la tradukon de verkoj tiel gravaj el la hispana literaturo, kiel la Romancaro aŭ Donkiĥoto.

Sed lia figuro gravas ne nur pro tio. Ankaŭ ĉar lia influo ebligis la aperon, kelkajn jarojn poste, de la t.n. Ibera Skolo. La verkistoj al ĝi apartenantaj agnoskatas internacie pro ilia elstara beletra produktado. Temas pri Gonçalo Neves, el Portugalio; Abel Montagut, el Katalunio; Suso Moinhos kaj Antonio Valén, el Galegio; Liven Dek (kaŝnomo de Miguel Gutiérrez Adúriz), el Kantabrio; kaj Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, el Madrido.

Antonio Valén verkis la enkondukon por ĉi dua bita eldono. En ĝi, li rimarkigas la tradukajn malfacilaĵojn de la Romancaro kaj kiel De Diego, dank' al siaj regado de Esperanto kaj propra poezia kompetento, sukcesis superi ilin kaj redoni tiun tradukan majstroverkon.

Antonio havas apartan rilaton kun Fernando, ĉar li, siatempe, kunordigis la paperan eldonon de *Gran diccionario español-esperanto*, ĉef-verko de De Diego, kaj nun, kune kun Miguel Gutiérrez Adúriz, li okupiĝas pri la konstanta ĝisdatigo de ties reta versio<sup>1</sup>.

Al la realigo de ĉi eldono ankaŭ kontribuis Manolo Parra, kiu skanis kaj tekstigis la originalan eldonon; Marcos Cruz, kiu kreis la bitlibron kaj reviziis la tekston; kaj mi mem, kiu kunordigis la projekton, verkis la prezenton, kaj desegnis kaj dezajnis la kovrilon.

---

<sup>1</sup> <http://www.esperanto.es/vortaro/>



La bita Romancaro deŝuteblas senpage el Bitoteko 2 en tri malsamaj formatoj: epub, tiu originale kompostita, kaj pdf kaj azw3, realigitaj laŭ aŭtomata konvertado. Jen la bitoteka ligilo por deŝuto: <https://hdl.handle.net/11013/6429>

HEF ankaŭ eldonis USB-karton, kiu enhavas la verkon en la tri formatoj 3.

Kiel dua parto de la omaĝo al Federico García Lorca, okaze de la 85-jariĝo de lia murdo, la Federacio eldonis en papera formato poem-antologion de la poeto, titolitan *Omaĝe al Lorca*, kompilita kaj tradukita de Miguel Fernández. La libron garnas pluraj eseoj de ĉi lasta pri la verkaro de la poeto kun sagacaj notoj kaj komentarioj.

Miguel, inda disĉiplo de la majstro De Diego, tute ne bezonas prezenton en Esperantujo, ja lia senkondiĉa sekvantaro ĉie multnombros. Tamen, tre resume mi parolu pri lia Esperanto-kariero: kunfondinto, kiel supre dirite, de la t.n. Ibera Skolo, li elstaras kiel originala poeto kaj majstras kiel tradukisto. Li ankaŭ aktivis kiel soci-kritika poeto en madridaj rondoj per esperanta voĉo, kaj ofte li havigas al ni la ŝancon ĝui lian tenoran voĉon en esperantaj aranĝoj.

Antaŭparolon de la libro verkis Duncan Charters, nuna prezidanto de Universala Esperanto Asocio kaj universitata profesoro pri fremdaj lingvoj ĉe la Kolegio Principia en Elsah (Usono). Kadre de la 78a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Valencio, li faris internacian someran universitatan prelegon pri la baza karaktero kaj signifo de la hispanaj kulturo kaj literaturo.

La libron komplementas traduk-kontribuajoj de Fernando de Diego kaj Antonio Alonso, kaj biografio pri Fernando fare de Diego de Antonio Valén.

La kompostadon de la libro faris Pedro Sanz. La kovrilo montras bildon pri la statuo de Federico García Lorca ĉe “Plaza de Santa Ana”, en Madrido. La originala fotografiaĵo estas verko de la profesia fotisto Vicente López Tofiño, speciale farita por ĉi eldono. Mi kunlaboris kiel kunordiganto.

Ambaŭ eldonaĵoj kalkulas je la financa apogo de Fundación Esperanto. Kaj eblas ilin mendi ĉe Hispana Esperanto-Federacio.

Restas nur varme rekomendi al vi la legadon de ambaŭ verkoj. Nepre ĝuu ilin!

Ana Manero

---

2 <http://bitoteko.esperanto.es>

3 Paperaj ekzempleroj de la unua eldono ankoraŭ aĉeteblas ĉe HEF kaj en la libroservo de UEA... kontraŭ tre favora prezo!



# DU UNUAJ PREMIOJ POR HISPANOJ EN BELARTAJ KONKURSOJ 2021



La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la 72-a okazigo en premifesto elsendita pere de la kanalo de UEA ĉe YouTube, *UEAviva*. La BK-feston kungvidis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) kaj Miguel Fernández, respektive Sekretario kaj Prezidanto de la Belartaj Konkursoj. En la BK partoprenis absolute rekorda nombro de 186 verkoj el la 5 kontinentoj.

Miguel Fernández anoncis la aperon de la libro *Ĉiuj steloj etas nokte*,

antologio de mikronoveloj partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj. Krome li deklamis la poemon *Soneto de la Lumturo*, de Suso Moinhos, el la libro *Laminarioj*. La poemon *Fratinoj*, de Kris Williams (Ungar) deklamis Sara Spanò. La BK-feston ornamis 3 kantoj: *Ekas la nokto*, kies teksto ricevis la unuan premion en la branĉo Kantoteksto, kaj estis muzikigita de Liven Dek kaj orkestrita de Antero Ávila; *Bela rev'*, kies teksto ricevis honoran mencion en la branĉo Kanto-teksto kaj estis muzikigita de Kajto; kaj *Venu al la kisoj*, de Miguel Fernández kaj Viktoro Solé. La videon fermis fota prezento de pluraj el la aŭtoroj de la mikronoveloj konsistigantaj la kolekton *Ĉiuj steloj etas nokte*

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021 re-spekteblas en la kanalo de UEA en Youtube, en la adreso: [youtu.be/NE1Ye1eh6o4](https://youtu.be/NE1Ye1eh6o4).

Jen la premioj aljuĝitaj:

## BRANĈO POEZIO

Juĝkomisiono: Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu.

Partoprenis 67 verkoj de 36 aŭtoroj el 23 landoj [1 el Oceanio, 6 el Azio, 1 el Afriko, 3 el Ameriko, 12 el Eŭropo]

La unua premio estas aljuĝita al “Koren de mallumo” de Miĥail Frolov el Rusio.

La dua premio estas aljuĝita al “Ĉe via cindro” de Benoît Philippe el Germanio.

La tria premio estas aljuĝita al “Ĉe la martkomenco” de Choe Taesok el Sud-Koreio.

Honora mencio estas aljuĝita al “La sonĝo” de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

## BRANĈO PROZO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele

Partoprenis 38 verkoj de 25 aŭtoroj el 17 landoj [4 el Azio, 3 el Ameriko, 10 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al “Mi trinkas vino” de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

La dua premio estas aljuĝita al “Parade antaŭ la reĝo” de Anna Lowenstein el Britio.

La tria premio estas aljuĝita al “Kredi” de Sara Spanò el Italio.

## **SUBBRANĈO MIKRONOVELO**

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Partoprenis 45 verkoj de 27 aŭtoroj el 16 landoj.

La unua premio – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al “Mia sozio” de Jorge Rafael Noguerras el Usono.

## **BRANĈO TEATRAĴO**

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipovic, Georgo Handzlik

Partoprenis 1 verkoj de 1 aŭtoroj el 1 lando.

La ĵurio aljuĝis neniun premion.

## **SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO**

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Saša Pilipovic, Georgo Handzlik.

Partoprenis 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

La ununura premio – premio María Cuevas – estas ne aljuĝita.

## **INFANLIBRO DE LA JARO**

Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Ricardo Albert Reyna, Jang Jeong-Ryeol.

Partoprenis 6 infanlibroj de 4 eldonejoj el 4 landoj [el Eŭropo].

La premio estas aljuĝita al la Eldonejo Dokumenta E-Centro pro la verko “La aventuroj de Jombor kaj Miki”.

## **BRANĈO ESEO**

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj.

La unua premio – premio Luigi Minnaja – estas ne aljuĝita.

La dua premio estas aljuĝita al “Por ke ĉiu komprenu ĉiun” de Aleksandro Melnikov el Rusio.

La tria premio estas ne aljuĝita.

Honora mencio estas aljuĝita al “Tridek malmortoj de Danielo” de Roman Dobrzyński el Pollando.

## **BRANĈO KANTOTEKSTO**

Juĝkomisiono: Ĵak Le Puil, Ankie van der Meer, Flavio Fonseca

Partoprenis 19 verkoj de 12 aŭtoroj el 11 landoj [8 el Azio, 1 el Ameriko, 10 el Eŭropo].

La unua premio estas aljuĝita al “Ekas la nokto” de Antonio Valén el Hispanio.

La dua premio estas aljuĝita al “Kanto trista” de Richard Hable el Aŭstrio.

La tria premio estas aljuĝita al “Robinson” de Petro Palivoda el Ukrainio.

Honora mencio estas aljuĝita al “Bela rev” de Ewa Grochowska el Francio.

Honora mencio estas aljuĝita al “La balado de l’ kukolo” de Serĝo Sire el Francio.

## **TAGO DE VETERANOJ DE UEA**

La 19an de septembro, post la anonco de la premioj de la Belartaj Konkursoj, UEA organizis en sia kanalo de Youtube la Tagon de la Veteranoj.

En 2021 la omaĝo estis dediĉita al Gian Carlo Fighiera. Dum ĝi estis esprimitaj pluraj atestoj de membroj kaj eksmembroj de Madrida Esperanto-Liceo, kiuj memorigis la tre valoran agadon de Gian Carlo kaj lia edzino Ada dum ilia loĝado en Madrido dum la 80aj jaroj. Vi povas spekti la tuton ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=2DRC0jWESso>.

# DENTORELAJ FERVOJOJ EN HISPANIO



Dentorela fervojo, ankaŭ konata kiel “dentrada fervojo”, estas tiu kun dentrada trakcilo, ĉefe uzata por ascendi tra krutaj deklivoj. Tipaj fervojoj ne povas superi deklivojn kun klino pli alta ol 16%, pro tio preskaŭ neniuj fervojaj relaroj en la mondo estas konstruita kun klino pli alta ol 10%. Tial, oni inventis la dentorelan fervojon, por marŝi sukcese tra pli grandaj deklivoj, ekzemple en la Pilato-monto en Svisio dentorela fervojo kapablas superi ĝis 48%-klina deklivo.

Kiel ĝi funkcias?

Sub la trajno, inter la radoj, ĝiras dentrado, kiu enmetas siajn radojn ene de stango kaj tio ebligas la transmision de la energio kaj la atingon de rekta antaŭa movo. Krome, ĝi evitas la glitadon de la vagonaro sur la reloj.

## Dentorela Fervojo

La dentrado helpas la ceterajn radojn iri antaŭen, ĝi ankaŭ evitas la glitadon de la radoj sur la reloj kiam ekzistas granda deklivo.



En la jaro 1812 la brita John Blenkinsop konstruis fervojon por tre malrapidaj lokomotivoj kun dentoreloj, anstataŭ la kutimaj radoj sur reloj. Poste, en la jaro 1862, la svisa Niklaus Riggerbach metis dentorelon meze de du radoj, naskiĝis tiam la dentorela fervojo. La unua vagonaro kaj reloj konstruitaj laŭ ĉi tiu sistemo estis inaŭgurita en Usono en la jaro 1869, por ascendi al la monto Vaŝingtono. Ekde tiam multaj pliaj dentorelaj fervojoj ekfunkciis, ĉefe en montaraj landoj kiel Svisio.

En Hispanio, malgraŭ la ekzisto de montaroj, ĉi tiu sistemo ne estis ofte konstruita, tamen ekzistis, kaj eĉ ekzistas, dentorelaj fervojoj en nia lando.

En Montserrat (Barcelono) oni konstruis la unuan dentorelan fervojon en Hispanio, en la jaro 1892, kun la celo komuniki tiun mondfaman monaĥejon kun la vilaĝo Monistrol kaj de tie al Barcelono. La fervojo estis amase uzata por turismi kaj pilgrimadi ĝis 1936. Post la enlanda milito, la linio daŭre funkciis, tamen en la jaro 1953 okazis grava akcidento, ok homoj mortis kaj aliaj 122 suferis vundaĵojn kiam tri trajnoj koliziis. Pro tio, la linio fermiĝis en la jaro 1957. En la 8-a jardeko la kataluna registaro pristudis la eblon funkciigi denove la linion al Montserrat per tiu dentorela fervojo, kiu ekigis la vojaĝojn en la jaro 2003.

En la urbo Granado, en la jaro 1919, oni proponis la ideon konstrui tramon tra 20 kilometroj inter la urbo mem kaj vilaĝo proksima al monto *Sierra Nevada*. En la jaro 1921 oni ekigis la konstruon de tiu trama linio kaj post kvar jaroj da granda laboro la tramo sukcesis ascendi de Granado ĝis la vilaĝo Canales. Ne estis eble fini la tutan projekton ĉar la tramo neniam estis profitodona. Post la enlanda milito, la hispana fervoja kompanio renovigis vagonojn, relojn, ankaŭ oni pliarĝigis tunelojn kaj oni konstruis novajn stacidomojn. Semajnfine la tramo pleniĝis per ekskursantoj dezirantaj viziti la plej altan monton de la Ibera Duoninsulo.

En la jaro 1973, la hispana registaro decidis konstrui grandan basenon, kiu inundus pli ol 5 kilometrojn da tramaj reloj. Do, oni decidis ĉesi la traman servon, la lasta vojaĝo okazis en la monato januaro de 1974.



Dentorela fervojo de Granado al Sierra Nevada.

Alia dentorela fervojo en Hispanio, nun funkcia, komunikas la vilaĝon Ribas de Freser (Ĝirono) kun la Valo Nuria. La fervojon oni inaŭguris en la jaro 1931 kaj denove la enlanda milito haltigis la prosperon de la linio. Post la milito la vagonaro estis ofte kontrolata de policianoj, pro la fakto, ke ĝi trakuris proksime al franca landlimo kaj oni timis, ke tiu fervoja linio povus esti uzata de kontrabandistoj kaj kontraŭ-frankismaj gerilistoj por iri de unu loko en alian. Pro tio, estis necese disponi pri speciala rajtigilo por vojaĝi en tiu trajno. En la jaro 1982 la hispana fervoja kompanio havigis ĉi tiun linion al la kataluna reĝis Moderna dentorela fervojo en la Valo Nuria en Ĝirono taro. Nuntempe ĝi estas la sola dentorela fervojo en Hispanio.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

[fervojista@esperanto.ac](mailto:fervojista@esperanto.ac)

*J, M, Rodríguez*

# LA STRANGA ANGULO

Skribas Viko

## Ĉapitro 2. Kiel detrui laborgrupon de ene.

Saluton, samlingvano.

Eble vi jam partoprenis en kelkaj grupoj, kiuj havis konkretan celon kaj devis labori por atingi ĝin. Mi ankaŭ. Dum tia sperto mi havis la ŝancon koni fakulojn pri la arto detrui la grupon, tiel ke ĝi ne atingos la celon. Ili ŝajnas, ke ne konscias pri sia potenĉava kapablo, sed mi ne povas kredi, ke tiom sukcesa konduto estas nur donaco de la naturo. Vere ili studis ie, diplomiĝis pri tia fako kaj promenas sur la surfaco de la tero malpermesante, ke bonkoraj movadoj havos sukceson.

Post longa plurjara observado mi jam pretas redakti la rezulton de la esplorado pri tiu afero. Do legu atenteme. Se vi parkerigus la jenajn punktojn sciigajn, vi havus povon haltigi ĉiajn laborgrupojn. Mi rimarkis, ke ne gravas ĉu la grupo havas lertajn bonkorajn kunlaborantojn, kiuj klopodas repreni la vojon, pacigi animojn, komprenigi homojn... la fakuloj pri detruo estas tiom altnivele instruitaj kaj kapablaj, ke ili neniam fiaskas.

Do jen la punktoj pri kiel sukcese solve detrui laborgrupojn estante unu el la membroj.

### 1. Principo de la persona atako.

Sentu ĉiun malkonsenton aŭ ne akcepton pri iu ajn propono via kiel atakon al via persono. Se iu malkonsentas, la fona kialo estas, ke li aŭ ŝi deziras damaĝi vin, plej eble ĉar li aŭ ŝi ne facile akceptas, ke vi tiom pravas, lertas kaj kapablas.

### 2. Principo de la vivo kiel socia reto.

Ne havu paciencon. Ĉar vi tiom facile uzas la sociajn retojn sendante retmesaĝojn, fejsbukaĵojn, ŭatsapaĵojn, telegramaĵojn, kakaotaĵojn kaj similajn similaĵojn... do sentu, ke ĉiuj ĉiam atendantas viaĵojn. Do se iu el ili ne rapide reagos, ne temos pri ne konekto aŭ pli oftaj personaj taskoj aŭ problemoj, sed certe temos pri la konscia ne volo respondi. Se la ne respondo estas sufiĉe longa, apliku la principon de la persona atako. "Sufiĉe longa" estas laŭ via vidpunkto.

### 3. Principo 1 de la submariĝo. Aranĝo de postaj decidoj.

Ne gravas kiom da membroj havas la grupo, ĉiam estas tro. Do oni bezonas zorgi serioze pri kelkaj temoj, skribante aŭ parolante kun aliaj precizaj membroj. Temas pri antaŭlabori, antaŭdecidi, antaŭkonsenti... tiel ke kiam alvenos la grupa kunveno, vi kaj viaj submaraj kunlaborantoj jam scios, kion fari kaj kiel.

#### 4. Principo 2 de la submariĝo. Ni-ili-ismo.

Ekde la unua momento de grupa laborado vi jam scias, kiuj membroj konsentos pri viaj vidpunktoj (alivorte, kiuj membroj lertas, kapablas kaj pravas, subgrupo LKP), kaj kiuj membroj donos al vi kelkajn problemojn, ĉar ili iom malsaĝas. Per submariĝa laboro parolu kun LKPanaj duope, emfazante vian subgrupan pravecon kaj la ne pravecon de la aliaj, kiuj eble estas malbonkoraj aŭ bonkoraj sed mallertaj. Finfine vi atingos dividi la laborgrupon en du eraĵeroj: Ni kaj Ili. Ekde tiam, ĉio facile povos esti komprenita dependante de la subgrupo partoprenata de la homo kiu proponas, parolas, komentas aŭ kritikis.

#### 5. Principo de la trivosta etiko.

a) Normigu laŭ la bezono, ke konkretaĵoj estu akceptitaj aŭ rifuzitaj. Alivorte kiam okazas io, kion vi celas, ke estu akceptita aŭ rifuzita de ĉiuj, proponu novan normon tiel, ke ĉiu komprenu, ke ĝi estas logika aŭ natura, pro tio nepre fiksitenda. Finfine, la konkretaĵo estos akceptita aŭ rifuzita ne pro via vidpunkto, sed pro la apliko de tiu nova normo.

b) Ne lasu oportunon profiti de la okazo, kiam iu ILI-ano ne sekvas normon, por subtreki tian malbonan konduton. Sed kelkfoje vi estu die komprenema kaj publike protektu la perfidulon.

c) Se estas vi, kiu ne sekvas la normon, lumigu la ceterajn membrojn sciigante, ke la preciza situacio ne precize respondas la precizan formon de la nuna normo; do oni bezonas ŝanĝi ĝin aŭ krei novan, kiu pli taŭgu.

#### 6. Principo de (via) bezonata ĉiama partopreno.

Sendube vi sufiĉe cerbumas kaj bone proponas. Oni ne povas antaŭvidi ĉu ĉiuj ankaŭ same kondutos. Pli bonas, ke vi zorgu pri la gravaj aferoj, eĉ pri tiuj kiuj ne tiom gravas.

Klopodu partopreni en ĉiuj temoj montrante vian scion. Ĉi tie oni povas elekti unu el du profiloj:

a) Malantaŭmura partopreno.

Konsistas en opinii sen agi. Vi opiniu pri ĉio; konsilu tion, kion oni devas fari; rimarku tiujn aferojn, kiuj malbone paŝas; priskribu vian sukcesan sperton kaj vian lertan interpretadon de la realo. Sed neniam ion faru, krom opinii. Nenio pli gravas ol lerta opinio kaj ideo. Aliaj zorgu pri la facila flanko el la afero, nome realigi viajn konsilojn. Se vi sufiĉe bone faras tion, atingos ke preskaŭ ĉiu kunveno ne finiĝos atingante la deciditajn celojn.



b) Ĉioplenuga partopreno.

Malgraŭ viaj ideoj, opinioj, analizadoj ktp sufiĉas por esti feliĉa pri via ĉeesto, vi jam scias, ke neniu finfine bone realigos ilin. Se vi deziras, ke io estu bone farita, vi mem devas fari ĝin.

Finfine la ceteraj, krom LKP-anoj, haltos, ne laboros, ĉar vi jam ĉion faras. Pro tia sento de neutileco, eble vi sukcese forlasigos ILI-anojn.

7. Principo de la racia agendo.

Ĉiuj plendas pri tro plena agendo. Sed vere la plej plena estas via. Ĉiu kunveno bezonas la kundecidon pri la loko, la horo, la tagordo aŭ listo de temoj, la maniero agi kaj la divido de roloj.

Kvankam mi skribis "kundecido", estu "via decido". Lerte atingu, ke tiuj menciitaj eroj estu laŭ via prefero. Ankaŭ "via" povas esti iom pli vasta, enhavante LKP-anojn. Ne hezitu uzi la principojn 1, 2, 3, 4, 5 kaj 6 por realigi ĉi tiun.

8. Principo de la senkulpeco.

Vi neniam kulpas. Neniu problemo povas esti alvenita de vi. Se iu ajn ekzemple sentis damaĝon pro viaj vortoj aŭ ago, la problemo estas, ke ŝi aŭ li tro sentemas. Se vi ekzemple alvenas malfrue, la problemo estas, ke la grupo ne akceptis vian antaŭan konsilon kaj elektis ne taŭgan momenton aŭ lokon aŭ ne sufiĉe klarigis. Kulpigu kaj plendu, sed rapide poste montru vian superan sintenon preskaŭ akceptante respondecon.

Estas pli da konsiloj. Sed ne bezonatas. Se vi regas tiujn ok punktojn, mi povas garanti, ke tiu laborgrupo rapide malutiliĝos, laciĝos, malesperos kaj finfine malaperos.

Restu feliĉa kaj home kohera.

Ĝis nian baldaŭan renkontiĝon, kun novaj konsiloj por atingi, ke la mondo estu sufiĉe malkomforta kaj stulta.

---

## DEZIRAS KORESPONDI

Jesús Pérez, apartado 180, 02660 Caudete (Albacete)

# MUZIKA ANGULO

## CAMEL

(Tiuj -preskaŭ- ignorataj majstroj...)

Antaŭparolo

Estas ja granda la nombro de muzikistoj kaj ensembloj kiuj komponas kaj surbendigas la tiel nomatan simfonian aŭ progresivan rok-muzikon. Certe, ekde ĉirkaŭ 1970, nomoj kiel *Pink Floyd*, *King Crimson*, *EL&P*, *Genesis*, ktp estas konataj de la sekvantoj de tiu ĉi muzika skolo. Kaj ne nur en Britio, ĉar ankaŭ en landoj kiel Italio, Germanio, Svedio, Meksikio kaj Hispanio tiu stilo havis elstarajn kreantojn; ja ensembloj kiel *Kayak*, *PFM*, *Le Orme*, *Banco del Mutuo Soccorso*, *Änglagård*, *Guadalquivir* kaj *Imán* -inter multaj aliaj- estas menciendaj.

Ofte okazas ke ne ĉiuj grandaj artistoj atingas sian meritindan sukceson. Kaj tio estas la kazo de *Camel*, brita muzik-ensemblo kies verkaro meritis, laŭ mia gusto, pli grandan atenton. Tiu ĉi artikolo estas mia eta omaĝo a ili.

la muzika kariero de *Camel* etendiĝas tra pli ol 50 jaroj, dum kiuj ili publikigis dek kvin albumojn kun originala muziko kaj ĉirkaŭ dek albumojn kun registraĵoj el vivaj koncertoj. La nombro de kompilo-diskoj kaj filmo-diskoj estas ankaŭ tre granda. Kaj la nombro de koncertoj estus preskaŭ nekalkulebla. Pro tio, ke mi nur celas bazan sciigan artikolon, mi fokusiĝu nur en la ĉefaj momentoj kaj verkaĵoj de tiu grandega kariero, ĉar iu detala aliro bezonus milojn da paĝoj.

Tial, mi dividos la rakonton en tri apartajn plen-aktivajn periodojn. Aldonaj neaktivaj aŭ malgravaj periodoj estos nur menciitaj.

### 1.- Unuaj paŝoj kaj klasika etapo (1971-1976)

En la jaro 1969, ie sude de Britio, la gitar-ludisto Andrew Latimer kuniĝis al la basgitaristo Doug Ferguson kaj al la tre juna drumisto Andy Ward, kaj kreiĝis la ensemblo *The Brew*, kiu laboris kiel triopo dum pli ol du jaroj. Sed, okaze de iliaj koncertoj, ili rimarkis ke mankis al ili kvara muzikisto, kiu scipovus ludi orgenon kaj pianon. Tial, ili metis anoncon en iu fama brita muzik-revuo serĉante klavariston, kaj iom poste alvenis Peter Bardens. Fine de 1971, la tiama kvarteto eknomiĝis Camel.

La muzika propono de Camel dum tiuj unuaj jaroj difineblas kiel miksaĵo de kelkaj stiloj kaj tendencoj, meze de la ascendo de la tiuepoka "simfonia roko": ĵazo, bluso, mezepokaj sonoj, bukolikaj atmosferoj, simfoniaj trajtoj, psikedelismaj kaj alternativaj sonoj, longaj kreitaĵoj, kompleksaj strukturoj, ktp. Pri la instrumentaro, menciendas la uzado de flutoj kaj ĉiuspecaj klavaroj. Drum-ludado kaj gitar-ludado estas impresaj pro ĝiaj kvalitoj. En kelkaj iliaj diskaj, kordaj kaj blovinstrumentaj orkestroj estos uzataj. Kaj, entute, rimarkeblas sonaj elstaraj -kaj laŭvicaj- delikateco, denseco kaj forteco.



Jen la fondinto de Camel, Andrew Latimer dum trejnado.

En 1973 aperas ilia unua disko kiu simple titoliĝis *Camel*, en kiu aŭskulteblas la plej kruda kaj senafekta flanko de la kvaropo. Intensaj instrumentaj fragmentoj aperas en tiu unua disko; kaj same okazos en preskaŭ ĉiuj venontaj iliaj verkoj.

La dua disko de Camel (1974) nomiĝis *Mirage* (Miraĝo). En ĝi aperas kelkaj siaj plej konataj kantoj, precipe tiu nomiĝanta *Lady Fantasy* (Sinjorino Fantazio) kiu temas pri 12-a minutaj longa muzik-peco, kie sukcediĝas tiaj malsamaj stiloj kiel metalroko kaj kampareca etosoj.

En 1975 Camel decidis registri sian unuan tut-instrumentan kaj konceptan albumon. Tiucele, ili muzikigis, laŭ ilia muzika vid-punkto, la novelon *The Snow Goose* (La Neĝa Ansero) publikigita en 1941 de *Paul Gallico*, usona verkisto kaj ĵurnalisto. Pro tio, ke s-ro Gallico oponis al tiu muzika verko kiu uzis la titolon de sia libro, Camel estis devigata modifi la nombron de ilia albumo, kiu fine aperis sub la nomo “Muziko inspirita de la novelo La Neĝa Ansero”. Tiu novelo rakontas teneran historion de amo kaj amikeco inter viro, knabino kaj ansero, kun tragika fino pro la unuaj paŝoj de la Dua Mond-milito.

Muzike, tiu ĉi verko estis aklamita de kritikistoj kaj ĝenerala muzikema publiko. La enhavo estas tute inspir-plena kaj delica. Plej eble, temas pri la plej rimarkinda instrumenta rok-muzika albumo. En 2013 Camel refaris, per pli modernaj rimedoj, la tutan enhavon, aldonante kelkajn detalojn kiuj faris ĝin eĉ pli ĝuinda muzika frandaĵo. Tiu nova disko nomiĝas la “Re-registrado de La Neĝa Ansero”, kaj ĝi estas -kaj restos- la lasta publikigaĵo en la historio de la ensemblo.

En la printempo de 1976, Camel publikigas sian kvaran albumon, titolitan *Moon Madness* (Luna Frenezo), en kiu ili iom reprenas la krudan kaj rektan sintenon de la unua albumo. Tamen, oni rimarkas pli modernajn klavarojn kaj instrumentojn kaj ankaŭ pli komercema sinteno percepteblas. Post la sekva turneo (en kiu partoprenis, je la unua fojo, saksofonisto) la basgitaristo *Doug Ferguson* anoncas, ke li forlasas la ensemblon pro malkonsento pri la estontaj muzikaj projektoj.



De aldekstre dekstren: Ward, Ferguson, Latimer kaj Bardens

## 2.- La malstabilaj jaroj (1977-1984)

La eliro de *Ferguson* okazigas plurajn ŝanĝojn en la vivo de *Camel*. Tiel, novaj membroj kaj muzikaj stiloj kontinue eniras kaj eliras la grupon. La muziko de Camel tendencas eniri pli komerceman proponon en ĉiu sinsekva verkaĵo. Dum tiuj malstabilaj jaroj, ok albumoj estis publikigitaj. Kvankam la kvalito de tiuj diskoj estas sufiĉe akceptebla, mi nur menciu la vivan duoblan albumon kiu, kompilante parton de la freŝaj materialoj -kaj kelke el la pli malnovaj- fermis tiun etapon. Tiu duobla albumo nomiĝas *Pressure Points* (Premopunktoj) kaj estis eldonita en 1985, fermante tiun periodon. Tiam, Camel disiĝis kiel ensemblo.

Samaj ŝanĝiĝoj okazis ene de la membraro de la grupo. Ekde 1982, *Latimer* restas la nura membro de la originala muzikistaro. Ne nur por la novaj surbendigaĵoj, sed ankaŭ eĉ por la koncertaj turneoj, oni kutime alvokis provizorajn muzikistojn, kiuj foje nur restis dum kelkaj monatoj. La tipa kvaropo de la unuaj jaroj tute malaperis, kaj dum iuj momentoj Camel aperis kiel ses- aŭ eĉ sepopo. Multaj novaj vokalistoj kaj instrumentistoj alvenis, sed ili estis tiom multaj, ke tiu ĉi modesta artikolo ne devas nomi ilin. Escepte, ni nomu basgitariston kaj kantiston *Colin Bass*, ĉar li estas la nura muzikisto kiu akompanos *Latimer*on dum la resto de la kariero de Camel.



Jen la kovriloj de la albumoj de la jaroj: 74, 75, 76, 77, 78, 84.


### 3.- Reveno kun propra eldonejo kaj grandaj verkoj (1991-2002)

En 1985 Andrew Latimer ĉesigis ĉiun aktivadon de Camel. Kune kun lia edzino, *Susan Hoover*, ili transloĝiĝis al Usono, kaj decidis krei sian propran disko-eldonejon, nome *Camel Productions*, ĉar la problemoj kaj disputoj de Camel kun la diversaj eldonejoj ŝajnis senĉesaj tra la jaroj. Pere de *Camel Productions*, Latimer kaj Hoover eldonis kvar albumojn kun nova materialo, kaj ĉirkaŭ dekon da albumoj kies enhavo estas registraĵoj de koncertoj okazintaj tra la tuta kariero de la ensemblo, ekde 1972 ĝis la ĝistama momento.

Pri la kvar novaj verkoj, direndas ke temas pri kvar ege flegitaj kreitaĵoj, kun longaj instrumentaj fragmentoj kaj sublimaj komponaĵoj. En ĉiuj tiuj diskoj, la tuta enhavo rilatas al unu temo, kiu estas traktita kaj disvolvita per la sinsekvaj pecoj de la disko. Tiel, direndas ke ni staras antaŭ preskaŭ son-bendoj de filmoj, kaj fakte, aŭskultante multajn fragmentojn de tiuj muzikaĵoj, oni havas la impreson ke temas pri veraj kinomuzikaĵoj. Aldone, direndas ke Susan Hoover kunlaboris kun Latimer en la verkado de la plimulto el la tekstoj de la kantoj de la mezaj kaj lastaj periodoj de la bando.

**Mi nomu almenaŭ du el tiuj elstaraj albumoj:**

- *Harbour of Tears* ("Haveno de Larmoj", 1996), kiu pritraktas la tristan destinon de miloj da irlandanoj kiuj, meze de la 19-a jarcento, estis devigitaj forlasi sian landon por elmigri al Usono kaj tie trovi viv-rimedojn. La haveno kie oni adiaŭis la forirantojn iĝis vera "haveno de larmoj".



- *A Nod and a Wink* (“Kapsigno kaj Okulsigno”, 2002), kiu entute rilatas al la belaj memoraĵoj kiujn Latimer konservis de sia infanaĝo.

Post la turneo de 2002, Camel ĉesigis sian kreadan aktivadon de novaj materialoj, kaj dediĉis sin nur al koncertoj en malgrandaj koncertejoj tra la mondo. Ekde 1991, Camel denove aperis sursceneje kiel kvarteto.

Tiel, *Andrew Latimer* kantis kaj ludis gitarojn kaj fluton; *Colin Bass* kantis kaj ludis bas-gitaron; kaj du aldonaj muzikistoj (klavaristo kaj drumisto) estis aldonitaj, kutime tiuj kiuj estis kunlaborantaj

en la respektiva antaŭa studio-disko. Ĉiukaze, direndas ke kelkaj tiuj muzikistoj partoprenis en pli ol unu disko kaj en pli ol unu turneo, fariĝinte iom “stabilaj membroj” de Camel. Ni citu, kiel ekzemplo, la talento-plenan kanadan klavariston *Guy LeBlanc*.

En 2006, Latimer kaj lia edzino decidis reveni en Brition. En 2008 oni anoncis ke Latimer suferas gravan malsanon kaj oni transplantis ostan medolon al li. Feliĉe, iom poste kaj tre lante, li komencis resaniĝi ĝis sia preskaŭ kompleta rebonfarto. Ekde tiam Latimer dediĉas sian tempon al la prizorgado de la muzika heredaĵo de la ensemblo kiun li mem fondis. Koran dankon, Andrew kaj via kunlaborantaro, pro via talento kaj pro via enorma laboro favore al arto kaj al pli bona mondo.




Colin Bass kaj Andrew Latimer dumkoncerte

Juan García del Río

# IOM DA MATEMATIKO (4) ...

## Ĉu ni dronos en la maro pro polusa degelo?



La bildo kiu akompanas tiun-ĉi artikolon temas pri kampanjo de la Vaska Registaro okaze de “monda tago pri la medio”. Ĝi tekstas “Mi fandiĝas ... kaj kun mi fandiĝas ĉiuj plaĝoj”. Kaj, sub la bildo, ĵurnalisto skribis “La eraro de vaska kampanjo kontraŭ klimatsanĝo”.

Eble iam vi spertis ke, se oni aldonas glacipecojn al trinkaĵo kiu pleniĝas glason, kiam la glacio degelas, la trinkaĵo ne superbordiĝas kaj falas ekster la glaso. Jam la greka matematikisto Arkimedo (-287/-212) rimarkis ke “kiu ajn objekto tute aŭ parte mergita en fluido (likvaĵo aŭ gazo) estas supre elpelita de forto, kiu egalas la peson de la fluido evakuata”. Tiu elpeliga forto dependas, do, ne de la peso de la objekto sed de la volumo de la fluido evakuata.

Revenante al nia bildo, la glacimonto, kiu parte flosas sur la maro, jam ricevis tiun elpeligan forton, kiu faras ke ĝi ne tute mergiĝu. Samtempe, ĝi evakuis la volumon de akvo,

kies peso egalas tiun forton. Sekve, kiam la glacio tute degelos, la akvo devenanta el ĝi miksiĝos kun la mara akvo kaj ĉi-ties volumo ne plialtiĝos.

Certe vi legis, aŭdis aŭ spektis en amaskomunikiloj alarmigajn raportojn pri klimatsanĝo ŝuldita al “forceja efiko”, sekva degelo de polusoj kaj dronigo de marbordoj sur kiuj etendiĝas grandaj urboj tutmonde. Skeptikuloj povas demandi al si ĉu tiu degelo de ambaŭ polusoj estus tiel terura kiel oni anoncas.

Komence, ni sciu ke estas fundamenta diferenco inter norda kaj suda poluso. La unua estas giganta glacimonto, kiu parte flosas sur la maro kaj plejparte mergiĝas en tiu maro. Do, same kiel okazas kun glacioj en trinkaĵo, la tuta degelo de la norda poluso havus nian efikon sur la plialtiĝo de la oceanoj.

Sed la suda poluso estas io alia: Ĝi estas kontinento, t.e., tero sur kiu kolektiĝis, laŭlonge de jarcentoj, grandan amason da glacio. Kontraŭe al la norda poluso, la suda ne flosas sur la maro. Tio signifas ke deĝelo de ĝia glacio aldonus plian volumon de akvo al la oceanoj kaj, sekve, ties alteco kreskus. Sed kion multe ĝi kreskus?



Ni povas supozi ke la Tero estas, proksimume, sfero. Sur tiu sfero, homoj desegnis imagajn periferian cirklojn, kiuj trapasas ambaŭ polusojn, la tiel nomataj meridianoj. Tiel kiel oni difinis la mezurunuon “metro”, post la franca revolucio de 1789, ĉiu meridiano estas ekzakte 40.000 km. longa.


Tio permesas kalkuli la teran radiuson. Ni memoru, el elementa lernejo, la formulon por kalkuli la longecon de cirkla periferio:  $L = 2 * \pi * r$ . De tie, la radiuso  $r$  estos  $r = L / 2 * \pi = 40.000 / 2 * 3,1416 = 6.366$  km (proksimume). Ni rimarkigu, ke la Tero ne estas tiel granda kiel oni supozas: ĝia radiuso estas, pli-malpli, la distanco de rekta vojaĝo de Madrido al Helsinko kaj reen.

Nu, tiel ke ni konas la longecon de la radiuso de la Tero, ni povas kalkuli la surfacoon de la tera sfero pere de alia formulo:  $S = 4 * \pi * r^2 = 509.265.373,5$  km<sup>2</sup> (proks.).

Alie, la parto de la tera surfaco kovrita de la oceanoj estas, proksimume, 70%, t.e., 70% de  $509.265.373,5 = 356.485.761$  km<sup>2</sup>.

Nun ni okupiĝu pri la suda poluso. Ĝi ripozas sur surfaco de 14.000.000 km<sup>2</sup> kaj la averaĝa dikeco de ĝia glacia tavolo estas 1,7 km. (fakte, oni ne scias precize tiun dikecon. Oni taksas ĝin inter 1,7 kaj 2,5 km. Ni prenu la plej malaltan, do tiu kiu donus malpli da glacio).

Sekve, la volumo de la glacio estos  $14.000.000 * 1,7 = 23.800.000$  km<sup>3</sup> (la brita BBC lastatempe informis ke tiu volumo estas iom pli: 26.500.000 km<sup>3</sup>).





Alie, eble vi iam spertis en fridujo, ke botelo plenplena de akvo kreas kiam la akvo glaciĝas, ĉar la volumo de glacio estas pli granda ol tiu de la akvo el kiu devenas. Kaj, inverse, kiam glacio degelas, la volumo de la akvo devenanta el ĝi estas pli malgranda, proksimume 90% de la glacio. Do, se la tuta glacio de la suda poluso degelus, la volumo de akvo, kiun ĝi liverus, estus proksimume 90% de  $23.800.000 = 21.420.000 \text{ km}^3$ .

Kaj tiel ke tiu volumo ripozus sur la tuta oceana surfaco (tio ne estas vero ĉar subakviĝus terenoj kiuj nuntempe ne estas kovritaj de la oceanoj. Sed ni malatentu pri tio), ĝi okazigus la jenan plialtigon de la oceana akvo:

Akvo-volumo el suda poluso / Oceana surfaco =  $21.420.000 \text{ km}^3 / 356.485.761 \text{ km}^2$   
=  $0,060 \text{ km} = 60 \text{ m}$ .

Tio signifus la malaperon sub la akvo de granda parto de hispanaj apudmaraj urboj, kiel Barcelono, Valencio, Malago, Bilbao, Santandero, ktp.

Ĉu ni devas jam ektimegi? Jes kaj ne. Ne, almenaŭ rilate la aĉeton de nova loĝloko en alta monto. La eblo, ke la tuta glacio de la suda poluso akviĝos, estas malgranda, despli ke dum la lastaj jaroj, en kelkaj zonoj de la poluso, eĉ kreskis la kvanto de glacio. Laŭ kelkaj kalkuloj (ekz. Tattersall, G.), estus bezonataj ĉirkaŭ 160 jaroj por degelo de la nuna tuta glacio de la suda poluso, sen aldono de plia nova kaj konsiderante nur la agadon de suna varmo.

Jes, ĉar ĉio, kio koncernas al tutmonda klimato estas sufiĉe komplika. Ne nur la glacio polusa kontribuos al plialtigo de la oceanoj: dum la lastaj jaroj oni observis plialtiĝon de la averaĝa temperaturo de la aero tutmonde. Tio, fine, varmigis la oceanojn, kio "dilatos" ilian akvon, t.e., la volumo de akvo pligrandiĝos. Oni kalkulas ke ĉiu plia grado de temperaturo de la oceanoj implicos 1,7 metra plialtiĝo de ilia akvo. Kaj ĉio ĉi sendepende de la kompleta degelo de la Antarkto.

Kaj ni ne forgesu la glaĉerojn, kvankam nur 9% el ilia tuta volumo troviĝas ekster la suda poluso: 8% sur Gronlando.

Do, la problemo estas reala kaj la homaro nepre devos serioze pripensi la sekvojn sur la klimato de kontraŭnatura vivmaniero, almenaŭ en la tiel nomata "Okcidento".

**Jesús M. García Iturrioz**  
***jmgiaa@hotmail.com***

# Cigana romancaro

Federico García Lorca



Hispana literaturo